Februaro

La cirkulero

65

2010

CENTRE CULTUREL ESPERANTO TOURAINE
Maison des Sociétés, Halles de Tours
Place Gaston Paillhou
37000 TOURS
02-47-55-20-10 ou 02-47-20-43-95

esperanto-touraine37@wanadoo.fr

Prezidanto	Dominique Baron, 15, impasse Marat, 37700 SAINT PIERRE DES C. ; 02 47 44 62 12
Vicprezidantoj	Juanita Turbillon, 4, jardin Ockeghem, 37000 TOURS ; 02 47 20 43 95
	Pierrette Formen, 52, rue de l'Auberdière, 37510 SAINT GENOUPH ; 02 47 45 51 58
Kasisto	Denise Le Brizault, 38, rue Losserand, 37100 TOURS
Sekretario	Jacques Gaumé, 6, imp. des Primevères, 37390 CHANCEAUX S/CH. ; 02 47 55 20 10

KIO OKAZIS ĴUSE ?

Vendredon la 4an, sabaton la 5an kaj dimanĉon la 6an de Decembro en "Les Halles" okazis la Festivalo de la Lingvoj, organizata de Linguafest'37. La posttagmezo de vendredo estis rezervita por la lernejanoj. J. Turbillon, J.-M. Simonet, P. Formen kaj J. Gaumé gvidis kursojn. Pluraj membroj deĵoris ĉe nia budo por informi la publikon.

QUE S'EST-IL PASSÉ RECEMMENT ?

Vendredi 4, samedi 5 et dimanche 6 décembre c'était le Festival des Langues aux Halles, organisé par Linguafest'37. Le vendredi après-midi était réservé aux scolaires. Juanita Turbillon, Jean-Mary Simonet, Pierrette Formen et Jacques Gaumé ont donné des cours. Plusieurs membres se sont relayés à notre stand pour informer le public.

Zamenhofa tago en Angers, sabaton, la 12an de decembro.

Invititaj de la "Centre Culturel Angevin d'Espéranto", 6 turanĝiaj esperantistoj kunvenis kun tiuj de Le Mans kaj Angers. Akceptataj de multaj anĵuanoj, proksimume dek kvin personoj alvenis je la 11-a en la bibliotekon de Angers (bela loko, lumega dank'al larĝaj kaj altaj vitraĵaj aperturoj). Ĝojo pro la revido de esperantistaj amikoj kaj pro la ekspozicio al ni proponata.

Ĝi konsistis unue de afiŝformataj paneloj plastizataj prezentantaj stadiojn de la zamenhofa vivo kaj de la esperanta evoluo. Ĉiu temo estis tre klara pro la rigoreca komentaro kaj pro la elekto de fotoj. Alia parto konsistis el dokumentoj en vitrino : malnovaj libroj kiel "l'Encyclopédie" de Diderot aperta je la paĝo dedicita al la "nova lingvo" de Faiguet de Villeneuve (1765), kiu pripensis racian lingvon ; antikvaj leteroj ; granda diverseco de libroj malnovaj kaj novaj, verkitaj en esperanto.

Ni povas diri granda "brave" al la aŭtoroj de tiu tre bonega laboro !

Ni manĝis bone kaj ne tre koste en la "Chambre des métiers", kie poste ni havis eblecon malkovri librojn de Christian Rivière kaj de André Cherpillod.

Poste s-ro Cherpillod prelegis "Espéranto hier et aujourd'hui". Li montris al ni malgrandan libreton : la unua Fundamento, eldonata en 1887. Poste s-ro Cherpillod klarigis kio estas aglutinaj lingvoj tra la mondo, poste li montris la vortfaradon en esperanto, pravigante la realaĵon de la esperanta lingvo.

Ni travivis bonegan tagon - kaj eĉ la vetero estis suna !

Jane Pinon

Sabaton, la 23ªn de Januaro, okazis la ĝenerala asembleo, sekvata de la gustumado de la tradicia reĝokuko.

Samedi 23 janvier eut lieu l'assemblée générale, suivie de la dégustation de la traditionnelle galette des rois.

VENONTAJ GRAVAJ DATOJ

Sabaton, la 27ªn de Februaro, en Les Halles, salono 120, je la 14ª1/2, C. Mauboussin rakontos sian vojaĝon en Gvatemalo (sekvo)

Sabaton, la 20ªn de Marto, en Les Halles, salono 120, je la 14ª1/2, D. Baron prelegos pri la unua kongreso de Esperanto en Bulonjo ĉe maro, li montros fotojn de 1905.

Sabaton, la 24ªn de aprilo, ni vizitos la kastelon de **Gizeux.** Vi ricevos informojn poste.

PROCHAINES DATES IMPORTANTES

Samedi 14 février, aux Halles, salle 120, à 14 h 30, C. Mauboussin racontera son vojage au Guatemala (suite).

Samedi 14 mars, aux Halles, salle 120, à 14 h 30, D. Baron fera une conférence sur le premier congrès d'espéranto à Boulogne sur mer, il montrera des photos de 1905.

Samedi 24 avril nous visiterons le château de **Gizeux.** Vous recevrez des informations plus tard.

Kalendaro de Esperanto-aranĝoj ĝis Julio 2010 (mi forigis kelkajn el ili pro manko de loko)

Kompilita ĉe Esperanto-Centro Eventoj en Budapeŝto. (fonto: http://www.eventoj.hu)

22 - 28. februaro
Vintra Internacia Semajno por Esperantistoj (VISE) en Braŝovo kaj Montaro Fagaraŝi, Rumanio. Okaze de Semajno de Internacia Amikeco, ni invitas vin pasigi kelkajn tagojn de la jaro 2010 en belega etoso, kune kun la membroj da E-klubo "AMIKECO" (Braŝovo), Rumanio. La programo estas por skiemuloj, sed ankaŭ por neskiantoj! Inf.: Rodica TODOR, B-dul Valea Cetăţii 22, bl. B 24, sc. A, ap. 5, RO-500289-Braşov, Romania. Rete: rodica_todor@yahoo.com

27. februaro - 6. marto
Mediteranea Esperanto-Semajno en komforta hotelo "Le Renouveau" en Agay (ĉe Saint-Raphaël), suda Francio. Matene trinivelaj kursoj, studado, promenado, familia vivo, vespere "animado?". Inf.: Monique Prezioso, 92 impasse Jean Moulin, FR-83700 Saint-Raphaël, Francio. Tel.: +33-4 94 83 06 88, rete: prezmoni@hotmail.com

---

2 - 5. marto
KEKSO en Hamburg, Germanio. Kreiva Esperanto-kurso por junaj komencantoj, kun urbovizito, lingvokursoj en 2 niveloj, dolĉaĵmanĝegado kaj multe da amuzaj ludoj. Inf.: Leo Sakaguchi, Am Kreuzberg 5, DE-63776 Mömbris, Germanio. Rete: jampgade@web.de

2 - 7. marto
Bibliaj Tagoj en Münster-Givenbeck, Germanujo. Bibliaj prelegoj de patro Willibald Kuhnigk OSB, preĝoj kaj kantoj el ADORU. Inf.: Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, DE-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio. Rete: eichkorn.b@t-online.de

31. marto - 6. aprilo
34-a Internacia Junulara Festivalo, IJF - en Ronĉenjo, Italio. La 34-a Internacia Junulara Festivalo de Itala E-Junularo okazos en Ronĉenjo, en la provinco de Trento, meze de la Alpoj. Krom mojosaj programeroj kaj amikema etoso, estas antaŭviditaj belegaj ekskursoj tra la montaro kaj eĉ porinfana festivaleto! Inf.: Itala Esperantista Junularo, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano, Italio. Rete: iej@esperanto.it

17. aprilo
32-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, Nederlando. Prelegoj (i.a. Mark Fettes), filmoj, libroprezentoj, k.a. En la libroservo ĉio rabatita. Inf:.: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Rete: uea@co.uea.org

17 - 24. aprilo
Festa Renkonto INternacia de GeknabOJ = FRINGOJ en kastelo Greziljono en Baugé, Francujo. Nia programo konsistos el PREPARO DE GRANDA FESTO kun spektaklo, ekspozicio, eble ludoj..., en kiu ĉiu preparos tion, kion li / ŝi plej ŝatas. Inf.: Elizabet' Barbay

25 - 29. aprilo
Printempa Krimeo en Krimeo, Ukrainio. Esperanta turista piedvojaĝo en Krimea montaro. Inf.: Roman Kozarenko

27. aprilo - 1. majo
Kurso de Esperanto laŭ matematika vidpunkto en kastelo Greziljono en Baugé, Francujo. Analizo kaj instruado de Esperanto laŭ maniero pli adekvata al homoj matematikemaj aŭ logikemaj. Debato pri diversaj temoj rilataj al Esperanto, al matematiko aŭ preferinde al iliaj komunaj karakteroj, pensmanieroj... Inf.: Kulturdomo de Esperanto, Château de Grésillon, FR-49150 Baugé, Francujo. Rete: kastelo@gresillon.org

29. aprilo - 9. majo
22-a Aroma Jalto en Jalto, Ukrainio. E-festivalo kies celo estas plialtigi lingvonivelon de partoprenantoj kaj konatigi ilin kun belega naturo de Krimeo. Inf.: Volodimir Hordijenko, p/k 35, UA-01133 Kiev, Ukrainio. Rete: volodomir@ukr.net

---

8 - 15. majo
62-a IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) Kongreso en Sofio, Bulgario. Inf.: Organiza Komitato, Bulgario, BG-1080 Sofia, str. Ivan Vazov 3, Bulgario. rete: kozsu13@freemail.hu

12 - 16. majo
Printempa BARo 2010 (inkluzive Ĉieleniro) en Bad Münder inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. Inf.: Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio. Rete: andim (ĉe) gmx (punkto) li

13 - 16. majo
Beneluksa Kongreso en Antverpeno, Belgio. Internacia kongreso kun la temo "lingva diverseco en Benelukso" kun danckoncerto de Kapriol' . Inf.: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio

---

21 - 24. majo
Komuna franca kaj germana Esperanto kongreso en Kaiserslautern, Germanio. 87-a Germana E-Kongreso kune kun la Franca Nacia Kongreso. Per la komuna aranĝo francaj kaj germanaj esperantistoj demonstras, ke amikeco inter najbaroj en Eŭropo estas memkomprenebla en Esperantujo. Inf.: Dirk-Werner Hartmann, Sprachschule Rahn, z.Hd. Herrn Hartmann, Karl-Marx-Str. 37, DE-67655 Kaiserslautern, Germanio. Rete: gek2010@esperanto.de

22 - 24. majo
7-a MEKARO - Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto ĉe Tririveroj, Kebekio, Kanado. Turisma amikeca semajnfino. Okazas vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracioj. Inf.: Esperanto-Societo Kebekia, 6358, de Bordeaux, Montréal, Québec, Canada, H2G 2r8; rete: informo@esperanto.qc.ca